

La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

FEBRUARO 1979
67-A JARKOLEKTO

1

ISSN 0014-0694
FONDITA EN 1913

Einar Dahl mortis

La internacia esperantomovado profunde funebras la morton de unu el siaj plej eminentaj kaj plej noblaj kunlaborantoj. Einar Dahl mortis en la aĝo de preskaŭ 75 jaroj, jaroj plenplenaj de senlaca laboro por ideoj kaj idealoj, kiuj estis por li sanktaj kaj nediskuteblaj.

Einar Dahl naskiĝis en Falun la 1-an de marto 1904 kaj trapasis tie la abituriantan ekzamenon. Post studoj ĉe la seminario en Karlstad kaj la slojdseminario de Nääs li estis dum pli ol kvar jardekoj popollerneja instruisto, ĉefinstruisto kaj rektoro en Uddevalla.

Jam en la jaro 1921 li lernis esperanton kaj tuj konvinkiĝis pri la bezono kaj neceso de vere internacia lingvo flanke de la naciaj lingvoj. Tra sia tuta vivo li fervore kaj sindone dediĉis siajn fortojn al la esperantomovado. Inter alie li dum multaj jaroj estis tutlanda studgvidanto de SEF, estrarano de Sveda Instruista Esperanto-Federacio, prezidanto de Universala Esperantista Pacifista Ligo, komitatano kaj ekde 1975 honora membro de UEA, krom multaj komisiaj en lokaj kaj regionaj organizaĵoj.

Pri Einar Dahl plene validas la jenaj vortoj, kiujn li siatempe skribis memore al sia amiko Ernfrid Malmgren: «Li estis homo, kiu kombinis klaran intelekton kaj senliman iniciaton kun praktika agado kaj admirinda laborkapablo, kaj kiam ĉiuj vojoj ŝajne estis blokita, li ĉiam trovis elirejon kaj solvon de la problemoj.»

Dank'al sia ĉiama afableco kaj persona ĉarmo Einar akiris



multajn geamikojn inter la samideanoj, kio multmaniere montriĝis dum la universalaj esperantokongresoj. Kiam «da svedo kun la forta voĉo» ekkantis la himnon en solena inaŭguro aŭ donis prudentan kontribuon al debato, lin ĉiam renkontis fortaj aplaŭdoj. El la pasinteco vekigis memoroj pri epizodoj, ekzemple kiam Einar Dahl parolis en Hyde Park en Londono aŭ kantis en ĝardena restoracio en Krakovo, kaj ambaŭfoje homoj amase alkuris kiel radioj en giganta rado.

PLI PRI EINAR DAHL
SUR LA LASTA PAĜO

Einar Dahl instruis esperanton en studrondoj kaj lernejoj, kelkfoje eĉ sub oficiala ŝtata kontrolo, aranĝis kaj gvidis kursojn kaj prelegsemajnojn, propagandis esperanton en radio kaj verkis librojn en aŭ pri esperanto, ekzemple *Dialogoj en Esperanto*, *Dialogoj kaj komedietoj*, *Huru leder man fortsättningskurser i Esperanto?*, *Lärobok i Esperanto för skolan*. Kiel sperta profesia pedagogo li kapablis koncize kaj konvinke prezenti la internacian lingvon. Same brila li estis kiel oratoro — liaj paroladoj laŭenhave kaj laŭforme ĉiam vekis atenton.

Per la memkomprenebla rajto de sia evidenta kompetenteco Dahl reprezentis siajn kuncivitanojn en plej variaj rondo kaj medioj. Tre frue li aliĝis al

la socialdemokrata laborista movado kaj plenumis multajn respondecplenajn taskojn: li estis prezidanto de la socialdemokrata distrikto de Bohuslän dum 40 jaroj, de la urba konsilantaro en Uddevalla 1959 — 1970 (membro dum 40 jaroj) kaj de la provinca deputitaro dum preskaŭ tri jardekoj. Dek ok jarojn li estis membro de la sveda parlamento kaj tie prenis plurajn gravajn iniciatojn rilate al esperanto — inter alie li instigis siajn kolegojn apogi proponojn pri UEA kiel kandidato por la Nobela pacpremio, kaj same efike li pledis por la pet-skribo al Unesko pri la starigo de komisiono kun la celo fari enketon kaj esploron pri la internacia lingvo.

Preskaŭ neniu regiono de la homa agadkampoj ŝajnis esti fremda al Einar Dahl. Tiel li donis sian tempon kaj siajn fortojn al la pacmovado, al kontraŭalkoholaj organizaĵoj, al skoltismo, al bonfara agado, al popolkleriga laboro, al amuzado kaj distrado. Unue en Falun kaj poste en Uddevalla li skribis loke aktualajn ŝercrevuojn, reĝisoris kaj mem aktoris en ili — unu ekzemplo el multaj pri lia deziro riĉigi kaj lumigi la ĉiutagan vivon kaj medion de siaj kunhomoj.

Povus esti multe por aldoni pri riĉe dotita kaj talenta homo, tutviva batalanto por altaj celoj, sed tamen ĉies amiko kaj nenies malamiko. La vivo kaj agado de Einar Dahl devontigas nin daŭrigi la laboron, al kio li donacis tiom da amo kaj entuziasmo.

Karl Söderberg

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet
Adress: Box 4009,
122 04 Stockholm-Enskede
Ansvarig utgivare:
Bertil Åkerberg
Redaktör: Franko Luin,
Mygdalsvägen 123,
135 42 Tyresö
Telefon hem: 08 - 712 82 91
I redaktionen: Sven
Alexandersson, Åke
Blomberg, Anita Lindblom,
Geoffrey Sutton
Prenumeration: 40 kronor
per år, postgiro 20 12 - 3,
Esperantoförbundet
Tidningen utkommer med
8 nummer per år: i februari,
mars, april, maj, september,
oktober, november och
december
Manusstopp: den 10, måna-
den före utgivningsmånaden
Fotosats: Esperantoförbundet
Tryck: Sturetryckeriet AB,
Stockholm 1979

Esperantoförbundet

Postadress: Box 4009,
122 04 Stockholm-Enskede
Besöksadress: Hägerav. 31,
(T-station Tallkrogen)
Telefon: 08 - 48 99 76
Förbundets expedition har
öppet tisdagar kl. 18 — 20
Postgiro: 20 12 - 3
Medlemsavgift: direkt-
ansluten medlem 50 kronor,
ungdomsmedlem under 26 år
25 kronor, familjemedlem
utan tidning 15 kronor
Prenumerationsavgift för *La
Espero* och *Esperantonytt*
ingår i medlemsavgiften.
Medlemmar under 30 år får
dessutom ungdomsförbundet
SEJUs blad *ktp*.

Esperantoförlaget

Postadress: Fack,
200 42 Malmö
Besöksadress:
Möllevångsgatan 20 B
Öppettider: 1 sept — 15 maj:
onsdagar kl. 10 — 11,
torsdagar kl. 17 — 18
Skriftliga beställningar
expedieras hela året, även
under sommaren
Telefon: 040 - 12 20 29
Postgiro: 578 - 5
Expedition:
Anna-Greta Strömne
Medhjälpare: Wivi Nilsson
Styrelsens ordförande:
Åke Blomberg

JESONE

Om detta nummer och kommande

När man sköter en tidning på fritiden kan det hända rätt ofta att det kan uppstå förseningar av en eller annan orsak. Detta nummer av *La Espero* skulle ha varit på tryckeriet i början av februari, och inte i slutet som nu blev fallet. Det gör att viss material känns omotiverat och försenat.

Redan nästa nummer kommer i tid, ungefär två veckor efter detta. Planeringen är redan långt framskriden. I mars-numret kommer du att hitta detaljerna om kongressresan, en kort presentation av kongressorten Luzern, mera om den svenska kongressen i Kungälv och en absolut nyhet: presentationen av den nyaste esperantoboken i Sverige — Harry Martinssons *Aniara* i översättning till esperanto!

Rubriken *Ĉiutaga esperanto* återkommer och kommer att handla om något så ovanligt som styrningen av Sverige: riksdag, kommunfullmäktige, länsarbetsnämnd osv. Inte alls lätt att veta vad det heter på esperanto! Säg, till exempel, vad heter länsstyrelse? Inte är det gubernia estraro som de flesta säger. Svar i nästa nummer.

För övrigt kommer du att hitta några nyheter i år i *La Espero*. Den ena är återinförandet av en gammal rubrik (den var med i den allra första *La Espero* 1913), *Jorden runt*, som kommer att ge i notisform några nyheter om vad som händer med esperanto jorden runt.

Den andra är införandet av en regelbunden litteratursida, med framförallt översättningar ur den svenska litteraturen — en följd av förra årets översättartävling.

Många nya även i december

Klubo Cent har under december fått ett stort tillskott nya «medlemmar». Här är de: Melita Dörr, Örebro
Bror Lindström, Vattholma
Anna Vedholm, Uppsala
Erik Carlén, Kumla
Malte Smith, Kävlinge
Ernst Pilblad, Skövde
Helsingborgs Esperantoförening
William Malmsten, Göteborg
Dagmar Malmsten, Göteborg
Hjalmar Geist, Enskede
Tore Fors, Kävlinge
Åke Blomberg, Lidköping
Edla Nilsson, Malmberget
Hj. Örtenblad, Ljungaverk
Siv Sjögren, Spånga
Einar Nilsson, Herrljunga

Traduka konkurso 1979

Por stimuli al tradukado el la sveda lingvo en esperanton Sveda Esperanto-Federacio kaj Eldona Societo Esperanto organizas tradukan konkurson 1979.

La traduka konkurso okazas en la branĉoj poezio, beletra prozo kaj faka prozo.

La konkursantoj rajtas partopreni per libera nombro de konkursaĵoj. La longeco de la unuopaj konkursaĵoj estu maksimume: 100 versoj por poezio, 10 tajpitaj paĝoj por prozo.

La konkursaĵoj devas esti tajpitaj kaj akompanataj de kopio de la originala teksto, kun klara indiko pri aŭtoro, libro, eldonejo kaj eldonjaro.

La konkursaĵoj devas atingi la ĵurion plej laste la 15an de aprilo 1979.

Se al unuopa branĉo alvenas kontribuadoj de malpli ol tri partoprenantoj, la ĵurianoj ne aljuĝas premion en tiu branĉo.

La premiojn decidis la estraroj de Sveda Esperanto-Federacio kaj Eldona Societo Esperanto.

La premioj estos disdonataj ĉe la jarkunveno de SEF en Kungälv. Konkursaĵoj, taŭgaj laŭ kvalito kaj longeco, aperos laŭeble en *La Espero*.

La konkursantoj partoprenas malkaŝe, sen pseŭdonimo.

La ĵurio estas la redakcia komitato de *La Espero*.

La konkursaĵojn oni sendu al Traduka konkurso 1979, *La Espero*, Box 4009, 122 04 Stockholm-Enskede.

Dora Andersson, Linköping
Einar Dahl, Uddevalla
John Wik, Kalmar
Rolf Nordfors, Huskvarna
Ulla Luin, Tyresö
Nils Brandemar, Stockholm
Jonatan Lönn, Eksjö
Gustav Nygård, Göteborg

Under 1978 har SEF fått från alla «medlemmar» i *Klubo Cent* nästan 10 000 kronor — ett tillskott som på ett mycket påtagligt sätt hjälpt SEFs ekonomiska och gjort vissa insatser möjliga.

Tack till er alla!

Nu kan du få SEFs stadgar



Vet du vad som står i SEFs stadgar? Om du svarar nej, så är du i gott sällskap — de flesta vet inte det, trots att de nu gällande stadgarnablivit antagna så sent som 1976.

Men nu finns de utgivna och t o m utskickade till klubbarna i några exemplar.

Så är du intresserad av dem, fråga i första hand hos din klubbstyrelse, i andra hand hos SEF.

SEJU träffas igen: norr om Stockholm

Den 10—12 november hade SEJU en lyckad träff i Bred sand utanför Enköping Nästa träff blir i Rösjö, norr om Stockholm den 27 april — 1 maj.

Rösjö ligger mellan Sollentuna och Täby — en anläggning som SEJU fick tag i genom Naturvännerna.

Träffen varar från fredag kväll (27/4) till tisdag eftermiddag (1/5). Från fredag kväll till tisdag morgon är man i Rösjö. Tisdag 1 maj hjälper de som vill Stockholms esperantister att värva nya medlemmar genom att dela ut flygblad eller demonstrera. Den som inte vill vara

med på det, får fixa maten åt fotfolket.

Pris: självkostnadspris — preliminärt 200 kronor. För det får man mat och logi. Blir det många deltagare, kan detta pris sänkas med ungefär 50 kronor. Man får i så fall tillbaka dem innan man åker hem.

Man ska ha med sig lakan eller sovplåse, stövlar, sångböcker, instrument, bärbara bandspelare, papper, penna, oömma varma kläder, regnkläder, recept, 2 kökshanddukar.

I nästa nummer av *ktp* kommer en särskild postgiroblankett att finnas med. Den ska användas för anmälan. Om du inte får *ktp*, skriv en rad till SEJU/SEF och beställ den.

Sista anmälningsdag 20 april.

Gör din röst hörd: motionera!

Motionera!

Inte så att du springer i skogen, utan så att du skriver motioner till SEFs årskongress. Det är det mest effektiva sättet att påverka SEFs agerande.

Motionerna ska vara hos styrelsen senast den 31 mars. Skriv kortfattat!

Är du direktansluten medlem?

Betalar du din medlemsavgift direkt till SEF? Då ska du betala avgiften nu!

Avgiften är densamma som under förra året:

50 kr för direkt medlem med tidning

25 kr för ungdomsmedlem med tidning (under 26 år)

15 kr för familjemedlem utan tidning.

Men helst bör du gå in i närmaste esperantoförening och betala avgiften den vägen.

Stockholms UK söker garanter

UEAs kongressstadga föreskriver, att varje kongressarrangör måste samla 10 000 gulden i garantikapital, för den händelsen att kongressen går med förlust.

Man behöver inga pengar, bara löften om att hjälpa till med en viss summa, om det blir aktuellt.

Att arrangera en världskongress är ett stort ekonomiskt företag och det *kan* hända, att det till sist blir en förlust — även om man kommer att göra allt för att det inte ska bli det.

LKK kommer därför med en

vädjan till alla som skulle kunna tänka sig att täcka en eventuell förlust. Det räcker med ett kort brev med ungefär följande innehåll:

«Jag förbinder mig att till Loka Kongresa Komitato för UK Stockholm 1980 betala högst XXX kronor för att täcka en eventuell förlust».

Det är inte nödvändigt, men man vill gärna att förbindelserna lyder på 1000 kronor.

Du kan ta examen i april i år

Esperantoexamen kommer i år att hållas **22 april**. Anmälningar till examen bör vara insända senast de 2 april.

Anmälningar och förfrågningar om högre examen görs hos Ebbe Vilborg (Prästgårdsvägen 2, 412 71 Göteborg, tel. 031 - 40 52 74), om lägre examen hos Oskar Svantesson (Skonertgatan 1, 421 74 Västra Frölunda, tel. 031 - 29 03 81).

Vi povos afranki per esperanto



Por honori la Universalan Kongreson de esperanto en Luzern la svisa poŝta administracio aperigas en februaro ĉijare specialan esperanto-poŝtmarkon.

Ankaŭ pasintjare, okaze de la UK en Varna aperis poŝtmarko, kiun eldonis la bulgara poŝta administracio.

”Rozkolora” kroniko pri SEF-membroj

La Espero povas noti en tiu ĉi numero kelkajn gratulindajn okazintaĵojn:

La 15an de novembro 1978 geedziĝis en la urbodomo de Stockholm Hartmut Traummüller el Aŭstrio kaj Neeltje Boersma el Nederlando. Atestantoj estis Kerstin kaj Sven Alexandersson. Ankoraŭ unu geedza paro, kiu konfirmas la maturan staton de esperanto.

La 7an de januaro naskiĝis Petra al Göran kaj Marianne Nilsson (antaŭe Andréasson) el Kungälv.

Ankaŭ en januaro, la 28an, naskiĝis Janko al Ulla kaj Franko Luin el Tyresö.

HODIAŬ

Kion Einar Dahl pluinstruas al ni

La forpaso de Einar Dahl aktualigas la laboron, kiun li faris en la sveda parlamento dum la 18 jaroj, kiam li estis ĝia membro. Kiel dro Humphrey Tonkin notas sur alia paĝo de La Espero, Einar Dahl estis unu el la pioniroj de la parlamenta agado. Ni en Svedio povis rimarki kiel grave estas havi aktivulon ene de la parlamento por efike labori sur tiu kampo. Post la emeritiĝo de Einar Dahl en 1970 nia tuta parlamenta agado subite troviĝis sur alia, pli malalta ŝtupo.

La forpaso de Einar Dahl ankaŭ memorigas pri alia agadkampo: agado inter politikistoj. Ni dum sufiĉe longa tempo diskutis, kaj dum niaj jarkongresoj kaj kaj en aliaj okazoj, la gravecon de daŭra informado al politikistoj, sed sen ke io vere okazu, almenaŭ dum pli longa tempo. Ni devos tre baldaŭ trovi formojn por solvi tion. Pluraj modeloj estas eblaj, sed tiu kiu verŝajne plej taŭgos estas tiu de etaj laborgrupoj konsistantaj el simpatiantoj de diversaj partioj — grupoj, kiuj intime kunlaboru kun la estraro de SEF por ricevi la teknikan kaj ekonomian helpon. Mi povas antaŭvidi plurajn tiajn grupojn: liberalan, socialdemokratian, komunistan, centrapartian ktp. Montriĝis, ĉefe eksterlande, ke ĝuste tia-specaj unupartiaj grupoj havas la plej grandajn eblecojn efike labori ene de la respektivaj partioj. Nur per vere efika informado al politikistoj ni povos atingi la situacion, kiun ni havis kun Einar Dahl en la parlamento.

Simile oni povos rezoni ankaŭ pri aliaj organizaĵoj, ne nepre politikaj, ekzemple pri la sindikatoj, kies politika rolo en la sveda socio estas pli kaj pli granda. Laborgrupo konsistanta el aktivaj sindikatoj (kaj ankaŭ ĉikaze ia divido inter la diversaj sindikatoj estus necesa) havus pli grandajn eblecojn atingi ion.

Dum la jarkongreso de SEF en Kungälv ni havos nekutime bonan eblecon diskuti ĝuste tiujn ĉi aspektojn de la esperanta informa agado. La gastpreleganto estos Grahame Leon-Smith, gvidanto de la sukcesa brita parlamenta agado kaj unu el la iniciatintoj de TUCEG, laborgrupo konsistanta el gvidaj britaj sindikaluloj kaj kooperativuloj.

Ni esperu, ke la forpaso de Einar Dahl kaj la speciala atento, kiun parlamenta agado ricevos dum la ĉijara jarkongreso de SEF donos al ni decidan puŝon por firme reekmarŝi sur tiu kampo de agado.

Franko Luin

La longa historio de ĉijara kongresurbo

Kungälv estas unu el la plej malnovaj lokoj de Svedio, konata jam en la vikinga tempo je la nomo Konungahela aŭ Kongahälla. La plej grava epoko de la urba historio estis la dek dua jarcento. Poste ekstis aliaj konkurencaj urboj, i.a. Lödöse.

loĝantoj povis vivi pli paco). En la fino de la dekoka jarcento Gustavo III decidis, ke ĝi estu malkonstruata. La rezulto estis ruinamaso. La loĝantaro eĉ rajtis preni ŝtonojn el la fortikaĵo por siaj privataj domoj. Tio tamen estis malpermesita de



Dum tiu tempo estis en la urbo aŭgustina monaĥejo, Kastalamonaĥejo, kaj en la dektria jarcento ankaŭ franciskana.

En la mezo de la dektria jarcento oni konstruis apud la urbo sur Ragnhildsholmen, insuleto ĉe la Hisinga flanko de la rivero Nordre älv, la kastelon Nyklaborg, kiu havis strategian situon en la rivero kaj tial ofte ŝanĝis posedanton. En la komenco de la dekkvara jarcento loĝis tie la sveda duko Erik. Vid-al-vidе situis la norvega urbo Kungahälla. En packontrakto en 1305 Nyklaborg estis juĝita al la norvega reĝo Håkon Magnusson. Sed Erik rifuzis forlasi la kastelon. Håkon sieĝis ĝin, sed sen sukceso. Tiam Håkon ricevis la konsilon konstrui fortikaĵon sur Bagaholmen kiel kontraŭaĵo al Nyklaborg. La konsilo estis akceptita kaj en 1308 oni komencis konstrui la novan kastelon Bagahus aŭ Bohus.

Komence ĝi konsistis nur el simplaj lignaj konstruaĵoj, sed baldaŭ oni konstruis cirklan muron kaj kvar angulajn turojn. Poste oni anstataŭigis ĉion eksteran per ŝtono kaj faris plurajn bastionojn.

En la jaro 1658 la fortikaĵo kune kun la tuta regiono estis transdonita al la svedoj, sed la fortikaĵo mem neniam estis okupita per armiloj.

Kiam la urbo ne plu estis limurbo, la fortikaĵo pli kaj pli perdis sian signifon (kaj la urbaj

Karlo XIV Johano, sed nur en 1898 oni komencis savi ĝin. Nun oni ĉiujare restaŭras ĝin. Multo tamen estas for kaj estas nun malfacile imagi al si la pompajn salonojn, kie multaj reĝaj kaj nobelaj personoj loĝis dum siaj vizitoj al la urbo.

Legante pri la historio de Bagahus aŭ Bohus oni facile povas samtempe imagi al si la signifon de la urbo mem. Memorŝtono en la fortikaĵa parko kaj monumento sur Nytorget memorigas pri unu historia okazintaĵo, la renkontiĝo (trekungamötet) inter la tri reĝoj Inge la maljuna, sveda reĝo, Magnus Barfot, norvega reĝo, kaj Erik Ejegod, dana reĝo, en la jaro 1101. Kiel kutime la historio nur registras reĝojn kaj ne temas pri la ordinaraj homoj, kies vivo dum la ĉiamaj militoj certe ne estis bona.

Aliaj historiaj vidindaĵoj troviĝas ĉe Stora Torget (La Granda Placo) kaj laŭ la malnovaj stratoj Östra kaj Västra gatan (Orienta kaj Okcidenta Stratoj), kiuj iras orienten kaj okcidenten de Stora Torget. La ligna preĝejo de 1679 kun i.a. belaj plafonaj pentraĵoj, la malgranda simpla urbodomo de la dekoka jarcento kaj la malnova gastejo Fars Hatt (nuntempe moderna hotelo kaj restoracio), estas kelkaj ekzemploj, sed interesaj estas ankaŭ la malnovaj domoj ĉe Östra kaj Västra gatan.

Kungälv estis dum multaj jaroj pitoreska idilio. Sed dum la

lastaj jardekoj ĝi rapide evoluiĝis al moderna industria kaj lerneja urbo, kiu tamen retenis la eturban ĉarmon.

Kungälv povas vere proponi multon al la vizitantoj. Por naturamantoj estas la bela Fontinregiono, kie situas i.a. la konataj lernejoj Nordiska Folkhögskolan kaj Nordens Folkliga Akademi (nia kongresejo), kaj iom pli norde rezervejo por sovaĝaj bestoj kun multaj lagoj kaj grandaj arbaroj, montoj kaj valoj. Se vi preferas la maron vi povas ludi, ekzemple, dometon en la libertempa vilaĝo kaj travivi

velboatajn regatojn, bani vin en la tre sala maro aŭ fiŝkapti de boato aŭ rekte de la rokoj. Se vi ŝatas golfludi aŭ dediĉi vin al alia sporto, ankaŭ ekzistas eblecoj por tio. Dumtempe vi povas senti la historiajn flugilfrapojn, se vi bone uzas vian fantazion.

Kungälv kaj Folkhögskolan/Akademin ofte estis gastigantoj de diversaj internaciaj konferencoj. Tial estas por ni speciale granda plezuro saluti la esperantistojn — la verajn internacistojn — bonvenaj al nia urbo dum pentekosto 1979.

Märtha Andréasson

— RECENZO —

Tiu ĉi poezilibro tute ne estas troa!



Tro multaj libroj kun poezio aperas. Tio estas mia opinio, ĉar mi kiel teknikisto vere sentas mankon de fakaj libroj.

Nun fakte okazis, ke mi legis poemojn. La aktuala libro en tiu ĉi recenzo vekis mian unuan atenton, kiam mi ekvidis la ĉarman desegnaĵon sur la frontpaĝo. Mi trafolumis la libron kaj trovis plurajn vere belajn ilustraĵojn.

Ne estis mia intenco legi ĝin, sed mi provis legi almenaŭ unu verson. Mi komprenis, ke ia surprizo sin kaŝis ie en la lasta strofo de tiu poemo. Do — mi legis la versojn de la poemo ĝis la sprita fino.


Sekve mi demandis, ĉu mi rajtas prunti la libron. Mi kunpor-

tis ĝin hejmen kaj post enlitiĝo mi legis 25 el la 49 poemoj.

Kia libro! Imagu al vi libron kompilita el la plej bonaj poemoj el la sveda *Barndomslandet* (Lando de l'infanaĝo). Mi fariĝis vere surprizita pro la rekta facile komprenebla lingva stilo. Perfekta ritmo, kun tre variaj, spritaj, dolĉaj kaj humuraj poemoj. Laŭ la frontpaĝo la verkisto verkis por la geknaboj de la mondo. Felice por ni, kiuj postlasis la junaĝon, tiu ĉi libro, laŭ mia koncepto, ne havas supran aĝlimon. Hodiaŭ mi devas redoni la libron al la posedanto. Kvankam mi tralegis la libron trifoje, mi devas aĉeti propran ekzempleron.

Roland Lindblom

Alla är välkomna till Kungälv i pingst



Esperantoförbundets kongress kommer i år att äga rum den 2 – 4 juni (pingsthelgen) i Nordiska Folkhögskolan/Nordens Folkliga Akademi i Kungälv. Inkvartering sker i elevrummen, av vilka de flesta är 1-bäddsrum.

Programmet kommer att presenteras i nästa nummer av La Espero, där du också kommer att finna en anmälningsblankett. Men redan nu kan du notera en del saker.

Vi har inbjudit en föredragshållare från England, en medlem av gruppen TUCEG, som arbetar för esperanto inom fackföreningsrörelsen och kooperationen. Vi hoppas också få höra en rapport om parlamentsgruppen och "Grupo Kvin", som arbetar inom radio och television.

Vi ska inbjuda svenska fackföreningsledare och politiker till en debatt om "Språket som hinder för internationella kontakter och internationellt samarbete". Den här debatten ska vi göra offentlig.

Vi kommer att göra en utflykt till Gamla Lödöse, vilken liksom Kungälv var en stor samlingspunkt på 1100- och 1200-talet.

KELI kommer att ordna en gudtjänst, vi hoppas i den gamla kyrkan från 1600-talet, och för bör det väl bli tillfälle att promenera längs Östra och Västra gatan och besöka Bohus fästning.

På kvällarna kommer vi att ha musik, dans och underhållning. Ta med musikinstrument och sångrösten, så hjälps vi åt att ha trevligt.

Du undrar vad det kostar? Paketpriset, dvs kongressavgift, mat, logi och utflykt blir 300 kronor. Se för nästa nummer av La Espero.

Förfrågningar om kongressen kan du göra hos Märtha Andreasson, 2265 Tolsered, 425 90 Hisings Kärra, telefon 031/57 11 33, eller hos Marianne Nilsson, Svenstorp 1063, 446 00 Älvängen, telefon 0303/467 38.

Välkomna till Kungälv och Esperantoförbundets 73-e årskongress!
Loka Jarkongresa Komitato

Hjälp oss att göra reklam för esperanto och kongressen. Köp brevmärket som finns här intill och använd det på all post. Det kostar 3,50 per karta om 10 st. plus 1 krona till porto, oberoende av antalet kartor. Beställ genom att sätta in en summa på pg 16 65 79-3, Esperantoförbundets årskongress 1979. Ange på talongen vad betalningen avser.



Luzern?

Har du redan anmält dig till Luzern? Inte? Då ska du skynda dig! Den 31 mars är sista anmälningsdagen med följande deltagaravgifter:

1. Icke medlem i UEA	415 skr
2. Medlem med årsbok	364 skr
3. Medlem med årsbok och 'esperanto'	290 skr
4. Make/maka till (1)	295 skr
5. Make/maka till (2) eller (3)	258 skr
6. Ungdom t o m 20 år	131 skr
7. Heltidsstuderande t o m 30 år	208 skr
8. Synskadad	160 skr

Upplysningar och blanketter hos s-ino Ester André, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel 040-6 52 09).

Betalningar till postgiro 14 74 29-5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö.

En bok är en vän.

LA FENOMENO SVISLANDO

av den kände författaren dr Baur. Boken utkommer inför 64-e UK med bistånd av schweiziska turistväsendet och omfattar bl a historia, industri, turism, litteratur, konst. 134 textsidor, 24 bildsidor. Begränsad upplaga! Pris med moms 32,75

SLOVAKA ANTOLOGIO

brett och populärt urval från 9-e århundradet till våra dagar. Inbunden, 538 sidor. Pris med moms 80,-

TRA DEZERTO KAJ PRAARBARO


av nobelpristagaren Henryk Sienkiewicz. Berömd äventyrsroman om två europeiska barns flykt genom Egypten och Sudan under religionskriget på general Gordons tid. Vackert, starkt plastband, 316 sidor. Pris med moms 78,50

ESPERANTOFÖRLAGET
Fack, 200 42 Malmö
Postgiro 578-5

Vänskapsveckan inte bara «jippo»

Initiativtagaren till *Semajno de Internacia Amikeco*, Erik Carlén, har fr o m 1979 överlåtit marknadsföringen i Sverige av allt material till Esperantoförlaget. Förlaget tillkännager med annons på annan plats i tidningen priser och leveransvillkor.

Det har ju i vår tid blivit modernt med dagar eller veckor för speciella ändamål. Många är kanske skeptiska och betraktar sådana arrangemang som jippon, t ex «vänliga veckan». Varför vara vänlig bara en av årets 52 veckor?



En del esperantister kanske resonerar så även beträffande *Semajno de Internacia Amikeco*, internationella vänskapsveckan. Vänskap över gränserna är esperantorörelsens grundläggande idé; det var den som inspirerade Zamenhof att skapa språket. Han såg aldrig esperanto som enbart ett mekaniskt hjälpmedel. Han såg det som ett medel att bygga upp vänskap och förståelse mellan folken.

Man må vara aldrig så rationell, man må hur mycket som helst betona esperantos rent praktiska fördelar, man må försöka litet skamset förneka idealismen i rörelsen. Men vi kan aldrig bortse från den ideella motivationen. Utan kärleken till språket och utan tron på att språket i åtminstone någon mån kan bidra till ökad förståelse mellan folken skulle esperanto för länge sedan ha varit dött och begravt.

Vänskap över gränserna är själva grunden för esperantorörelsen, och det är sannerligen inte något som är begränsat till en enstaka vecka varje år. Erik Carlén har naturligtvis aldrig ifrågasatt detta självklara faktum. Men genom att en vecka varje år koncentrera uppmärksamheten på esperantorörelsens grundidé, internationell

vänskap, ville han skapa uppmärksamhet utåt för denna idé och för språket esperanto.

En vecka varje år, sista hela veckan i februari, skulle ägnas åt speciella manifestationer för internationell vänskap och för esperanto. Carlén tänkte ett värdigt arrangemang, t ex ett föredrag i samband med en middag, till vilken skulle inbjudas framstående kulturpersonligheter och politiker.

Tyvärr är det nog så, att Carléns idé blivit mer uppskattad utomlands än i Sverige. I t ex Chicago har officiella middagar

etc. anordnats. Nu arbetar vi kanske i Sverige på litet anordnande sätt och formerna för manifestationerna kan ju variera mellan olika länder. Men nog borde åtminstone de större klubbarna kunna anordna någon mer eller mindre officiell sammankomst under vänskapsveckan, något som gör intryck på utomstående och leder till recensioner i pressen. Ryck upp er, Stockholm och Göteborg och Malmö m. fl!

Vi svenskar har sen gammalt kutymen att sända jul- och nyårshälsningar till vänner och bekanta. Dessa hälsningar sänder vi ibland till personer, som vi sällan träffar och sällan skriver en rad till. I vänskapsveckans idé ingår också att sända hälsningar till vänner utomlands. Du kan säkert erinra dig att, förutom personer som du upprätthåller regelbunden kontakt med, finns det en del som du numera sällan skriver till. Varför inte sända även dem en hälsning i samband med vänskapsveckan. Det finns färdigtryckta kort, så det är egentligen bara ditt namn du behöver skriva förutom mottagarens namn och adress. Inte mycket arbete alltså. Och en sådan hälsning kan ha större betydelse än du tror. Kostar litet, men kan be-

tyda så mycket!

Låt oss göra litet mera av *Semajno de Internacia Amikeco* i år. Ordna en sammankomst, hur enkel som helst men värdig, om du har en mindre esperantoförening på orten. Och sänd hälsningar till gamla och nya vänner.

Observera dock: allt måste göras under sista hela veckan i februari (19 — 25), inte heller kort eller brevmärken får användas under någon annan tid.

Ake Blomberg

Du behöver UEA.
UEA behöver dig.
Bli medlem i den
internationella
esperanto-orga-
nisationen!

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

19 — 25 februari 1979

Postkort, i satser om 10 per sats 7,—
Brevmärken, i satser om 30 per sats 6,—
Affischer, i satser om 10 per sats 20,—

Priserna inkluderar moms och porto. Expedieras endast mot förskottsbetalning.

ESPERANTOFÖRLAGET
Fack, 200 42 Malmö
Postgiro 578 - 5

— OPINION —

Ett enkelt vykort räcker som svar

Flera svenska tidningar har i december tagit in en TT-notis om att esperanto i tysthet firat 100-årsdagen av språkets tillkomst. Vill man ha publicitet, så brukar det sägas att fel eller rätt gör detsamma, bara det skrivs.

Vi vet att en del landsortstidningar tar in ett och annat fördelaktigt om esperanto, medan de större tiger för det mesta.

När det nu råkar hända att en och annan större tidning skriver om esperanto på ett sätt som grundats på felaktiga informationer och kryddats med ironi, så vill vi gärna rätta dem.

Uppsökande journalistik, när det handlar om esperanto, förekommer knappast.

Hur skall vi agera när «husorganet» kommer med rena sakfel och därav felaktiga slutsatser?

Vi har inte så många inom våra led som är beredda att skriva välformulerade artiklar eller insändare, men alla skulle kun-

na göra följande:

Den dag du läser något felaktigt om esperanto i din tidning, så tag fram ett vanligt vykort och skriv till tidningens redaktion och påpeka helt kort att du läst artikeln och funnit att den innehåller diverse fel. Hänvisa exempelvis till Esperantoförbundet, som kan lämna korrekt information. Får du plats, kan du fråga om tidningen vill att läsarna skall tro på vad som skrivs i den, så bör de givetvis ta in en rättelse. I annat fall vet du ju inte, om du kan lita på någon artikel i tidningen.

Jag är övertygad om, att ett par hundra brev eller kort från en tidnings läsekrets, som kort och gott konstaterar att tidningen förmedlat felaktiga informationer, skulle ge en avsevärt större effekt än 4 — 5 klipp och påpekanden till förbundet.

Tidningarna säger sig gärna vilja ha kontakt med läsarna. Låt dem få det!

Roland Lindblom

(tiel ke ŝi sin trovis en granda embaraso). Kiam li havis dek ses jarojn kaj preparis sin por iri kun la aliaj, Āsa tion malpermesis, ĉar li estus ankoraŭ tro juna kaj havus tro delikatan sanstaton; kaj kiam Toste demandis, ĉu ŝi por ĉiam intencas lin eduki kiel kuirejan ĉefulon kaj virinheroon, ŝi eksplodis per tia furiozo, ke Toste ektimis kaj lasis ŝin kaj ĝojis, ke li mem povis foriri kiel eble plej rapide.

En tiu aŭtuno Toste kaj Odd malfrue revenis kaj estis perdita tiom el la ŝipanaro, ke la restintoj apenaŭ sufiĉis por la remiloj; sed ili tamen estis kontentaj kaj havis multon por rakonti. En Limerick la gajno estis malgranda, ĉar la ejraj reĝoj en Munster jam fariĝis tiel potencaj, ke la vikingoj tie preskaŭ nur kapablis defendi sin mem; sed amikoj de Toste, kiuj estis tie kun siaj ŝipoj, demandis lin, ĉu li volas partopreni atakon kontraŭ somermeza foiro, kiu okazas en Merioneth en Wales, en loko kie vikingoj neniam estis, sed kien oni nun povus iri helpe de kelkaj fidindaj vojomontristoj, kiujn la amikoj de Toste tenis en preteco. Odd persvadis Toste, ke ili partoprenu, kaj ankaŭ la ŝipanaro volis; kaj en sep ŝipoj ili albridiĝis apud Merioneth kaj marŝis ĝenan distancon en la landon kaj nerimarkite venis al la foiro. Fariĝis akra batalo kun certa homperdo, kaj la vikingoj venkis kaj konkeris grandan predon en formo de varoj kaj kaptitoj. Post tio ili velveturis al Cork kaj vendis siajn kaptitojn, ĉar en Cork de longa tempo kolektiĝas sklavkomercistoj de ĉiuj anguloj de la mondo por elekti inter la kaptitoj, kiujn la vikingoj portas tien; kaj la reĝo tie, Olof kun la Gemoj, kiu estis kristano kaj tre maljuna kaj saĝa, kutimis mem aĉeti tiujn, kiujn li trovis konvenaj, por poste permesi al parencoj reaĉeti ilin, kun bona profito por li. De Cork ili velis hejmen en forta akompano, por ne fali en la manojn de piratoj, ĉar ili havis malmultan emon batali kun malforta ŝipanaro kaj multaj riĉaĵoj en la ŝipo. Tiel ili sukcesis neatakite ĉirkaŭiri Skagen, kie kutimis embuski homoj de Vik kaj Vestfold por kapti riĉe ŝarĝitajn ŝipojn hejmenvelantajn.

Post kiam la ŝipanaro ricevis sian parton de la predo,

restis multo al Toste; kaj pesinte sian arĝenton en la kamero li diris, ke vojaĝo tia, kia tiu ĉi, povas esti bona fino de liaj ekspedicioj kaj estontece li intencas resti hejme, tiom pli ĉar lia korpo komencas rigidiĝi kaj Odd nun povas prizorgi ĉion tiel bone kiel li mem kaj cetero havos helpon de Orm. Odd diris, ke li opinias tion saĝa parolo. Sed Āsa tuj diris, ke ĝi ne estas saĝa; ĉar sen dubo multe da arĝento estas gajnita, sed tiom da homoj manĝas ĉe ili ĉiun vintron, ke tio ne longe sufiĉos; kaj ĉu oni povas fidi, ke Odd ne malŝparos la tutan profiton por siaj virinoj sur Irlando, se li eĉ zorgos pri tio, ke li revenu hejmen; kaj Toste devus kompreni, ke la rigidecon en la dorso li ricevas sidante senlabora ĉe la fajro dum la vintroj, ne kiam li estas sur la maro; kaj al ŝi estas jam sufiĉe, ke ŝi stumblas super liaj kruroj dum unu duono de la jaro. Ŝi ne povas kompreni, ŝi diris, kiaj estas viroj nuntempe; ĉar la frato de ŝia propra avo, Sven Ratnazo granda heroo inter Göing-anoj, pereis kiel viro en batalo kontraŭ smolandanoj tri jarojn post kiam li drinkis ĉiujn sub la tablon ĉe la edziĝofesto de ŝia plej maljuna nepo; kaj nun oni aŭdas virojn en siaj plej bonaj jaroj paroli pri doloroj kaj ili ne hontas morti sur la pajlo kiel bovinoj. Sed nun Toste kaj Odd kaj ĉiuj revenintoj ricevos bonan bieron kiel bonvenajon, el kvanto kiu bongustos al ili; kaj Toste forĉasu tiajn pensojn el ŝia kapo kaj tostu por same bona vojaĝo en la venonta jaro; kaj post tio ili havos bonan vintron kune, se nur neniu faros al ŝi ĉagrenojn per tiaspeca parolaĉo.

Post kiam ŝi foriris por prizorgi la bieron, Odd diris, ke eble Sven Ratnazo elektis la smolandojn kiel la pli bonan alternativon, se ĉiuj virinoj en tiu familio faris tiom da bruo kiel ŝi; kaj Toste diris, ke li ne volas tutplene kontraŭdiri tion, sed ke ŝi estas multmaniere brava virino kaj ke li ne volas pli ol necese ŝin inciti, kaj ankaŭ Odd ne devas tion fari.

En tiu vintro ĉiuj rimarkis, ke Āsa jen kaj jen iris pala kaj premata prizorgante siajn devojn, kaj ke ŝia longo kuris

malpli rapide ol kutime; pli ol iam antaŭe ŝi zorgis pri Orm kaj kelkfoje ŝi haltis kaj lin rigardis, kvazaŭ ŝi havus vizion. Orm estis jam plenkreska kaj povis laŭ forto konkuri kun ĉiuj samaĝaj kaj multaj pli aĝaj. Li estis ruĝhara kaj havis helan haŭton kaj larĝan spacon inter la okuloj. Li estis kurtnaza kaj larĝbuŝa, longbraka kaj iom kurbdorsa; li estis moviĝema kaj rapida kaj traktante arkon kaj lancon pli lerta ol la plej multaj. Li facile falis en furiozon kaj tiam li povis sin blinde ĵeti sur tiun, kiu lin incitis; kaj eĉ Odd, kiu pli frue kun plezuro lin paligis kaj furiozigis, nun jam fariĝis singarda kun li, ĉar lia forto lin faris danĝera. Sed cetero li estis trankvila kaj obeema kaj ankoraŭ konservis la kutimon en ĉio sin submeti al la deziro de Āsa, malgraŭ tio ke li jen kaj jen kverelis kun ŝi, kiam ŝiaj zorgoj ŝajnis al li ĝenaj.

Nun Toste donis al li armilojn de viro, glavon kaj larĝan hakilon kaj bonan helmon, kaj Orm mem faris ŝirmilon, sed maŝkiraso mankis, ĉar neniu en la domo konvenis al li, kaj nuntempe malmultaj maŝforĝistoj restis en la lando, ĉar la plimulto el ili iris eksterlanden, al Angolando aŭ al la jarlo en Rouen, kie ili ricevis pli altan pagon. Toste opiniis, ke Orm povas kelkan tempon kontentiĝi je leda ĉemizo, ĝis li povas havigi al si bonan ĉemizon sur Irlando: tie ĉiam en ĉiuj havenoj troviĝas batalkostumoj de mortintoj je malaltaj prezoj.

Kiam ili en iu tago sidis ĉe la manĝo parolante pri tio, Āsa metis sian vizaĝon kontraŭ la brakoj kaj komecis plori. Ĉiuj silentiĝis kaj rigardis al ŝi, ĉar nur malofte ŝi faligis larmojn; Odd demandis, ĉu ŝi havas dentodoloron. Āsa viŝis al si la vizaĝon kaj sin turnis al Toste; ŝi diris, ke la parolo pri vestoj de mortintoj ŝajnis al ŝi malbona antaŭsigno, kaj ŝi estas jam certa, ke Orm pereos tuj kiam li sekvos ilin sur la maron; ĉar jam tri fojojn ŝi en siaj sonĝoj vidis lin kuŝi sanganta sur ŝipbenko, kaj ĉiuj scias ke ŝiaj sonĝoj estas fidindaj. Tial ŝi nun volas peti al Toste, ke li estu bona kontraŭ ŝi kaj ne pereigu la vivon de Orm sennecese, sed lasu lin resti hejme dum tiu ĉi somero; ĉar ŝi kredas,

ke la danĝero lin minacos nun, baldaŭ; kaj se li povos ĝin transvivi, li eble estos malpli minacata poste.

Orm demandis, ĉu ŝi povis vidi en la sonĝo, kie li estis vundita. Āsa diris, ke ŝi ĉiun fojon tuj vekigis pro teruro ĉe la vido; sed ŝi vidis ke liaj haroj estis sangaj kaj lia vizaĝo tre pala; kaj tiu ĉi sonĝo ŝin jam multe premis, ĉiam pli kiam ĝi revenis, sed pli frue ŝi nenion volis diri.

Toste sidis pensema kaj poste diris, ke ne multon li scias pri sonĝoj kaj neniam havis timojn pro tiaj aferoj.

—Ĉar la maljunaj homoj kutimis diri, ke kiel ŝpinos la Ŝpinistinoj, tiel estos. Sed kiam nun vi, Āsa, jam tri fojojn sonĝis la saman sonĝon, tiam ĝi eble tamen estas averto; kaj ni jam perdis sufiĉe da filoj. Tial mi ne kontraŭdiros al vi en tio ĉi; kaj Orm povos resti hejme dum tiu ĉi somero, se li mem konsentas. Mi nun havas la senton, ke mi bone povas vojaĝi ankoraŭ unu fojon; tiel eble estos plej bone por ni ĉiuj.

Odd konsentis kun Toste, ĉar li multajn fojojn rimarkis, ke la sonĝoj de Āsa realiĝis. Orm ne estis kontenta pri tio, kion oni decidis, sed li havis la kutimon sin submeti al la deziro de Āsa en gravaj aferoj; kaj post tio nenio pli estis parolata pri tio.

Kiam la printempo jam venis, kaj sufiĉe da viroj el la interno de la lando jam konsentiĝis kun Toste pri spaco inter lia ŝipanaro, li kaj Odd forvelis kiel kutime kaj Orm restis hejme. Li portis malkontenton kontraŭ Āsa, kaj kelkfoje li sin ŝajnigis malsana por ŝin timigi; sed kiam ŝi urĝiĝis per zorgado kaj kuraco, li mem ekkredis tion, kion li ŝajniĝis, kaj havis malmulte da ĝuo el sia ludo. Āsa ne povis forgesi sian sonĝon, kaj spite al ĉiuj ĉagrenoj, kiujn li kaŭzis, ŝi ĝojis, ke ŝi lin havas en la hejmo.

Sed en tiu somero komenciĝis lia unua vojaĝo, kaj Āsa ne estis konsultita.

La sveda gazetaro memorigis pri Dahl

La forpaso de Einar Dahl kaŭzis plurajn longajn nekrologojn en la gazetaro. Per la subaj vortoj *Bohuslänningen* memoris Einar Dahl la 19-an de januaro 1979:

Li estis konata en vastaj rondoj, ne nur en sia lando, sed ankaŭ ĉirkaŭ la mondo. Dum multaj jaroj li estis kvazaŭ institucio en Uddevalla kaj en la provinco Bohuslän pro siaj multflankaj postenoj en la ŝtata kaj provinca parlamentoj, en la deputitaro de la urbo Uddevalla, en la rondoj lernejoj, inter esperantistoj de la mondo kaj en multaj aliaj rilatoj. Malamikojn li verŝajne ne havis, post kiam li finis siajn rondvojaĝojn de politika agitado en la jaroj de sia juneco. En tiu tempo kontraŭuloj povis aperi, sed Einar Dahl ĉiam senarmigis ilin per sia granda individua ĉarmeco.

Al malmultaj estas konsentita tiel agoplena vivo kiel al li. Li estis parlamentano, prezidanto de la provinca parlamento kaj de la urba deputitaro, ŝarĝita per gravaj postenoj multflankaj, sed krome li trovis tempon por gravaj taskoj en la kontraŭalkohola movado kaj inter la skoltaj, en la movado esperantista, sur la scenejo por aperi kiel distra aktoro, agadi en bonfaraj societoj ktp. Jes, ĉie kie oni bezonis helpon por bona celo, tie Einar Dahl disponigis sian talenton.

Li sufiĉis kiel aganto sur tiom da kampoj, ke oni preskaŭ povus forgesi priskribi la profesion, kiun li elektis kaj al kiu li dediĉis la plej longedaŭran laboron, nome tiun de instruisto kaj lernejestro.

En marto tiun ĉi jaron li estus atingonta 75-jaran aĝon. Li naskiĝis en Falun kaj fariĝis abituriento en la jaro 1924. Post trapaso de la instruista seminario de Karlstad kaj slojda seminario de Nääs li komencis sian instruistan oficon en Uddevalla en 1927.

Tre frue Einar Dahl fariĝis membro de la laborista movado, kie oni frue rimarkis lian grandan talenton kiel agitisto. Tiel komenciĝis la longa vico de politikaj postenoj.

Jam en 1930 li fariĝis distrikta prezidanto de la socialdemokrata partio. Tiun postenon li tenis 40 jarojn.

Saman jaron li fariĝis mem-

bro de la urba deputitaro, kie li ankaŭ agadis 40 jarojn, el tiuj jaroj kiel prezidanto de 1959 ĝis 1970.

La politika vojo kondukis lin en la provincan kaj ŝtatan parlamentojn. Li apartenis al la provinca parlamento 1938 — 1941 kaj poste denove 1946 — 1970, ankaŭ tie plurajn jarojn kiel prezidanto.

Dum 18 jaroj li apartenis al la ŝtata parlamento, unue en la ĉambro de deputitoj kaj poste en la senato. En la parlamento li estis membro de la konstitucia komisiono kaj de la komisiono pri ĝenerala aferpreparado. Krome li funkciis kiel sekreta-

Mesaĝo de dro Tonkin

La prezidanto de Universala Esperanto-Asocio, dro Humphrey Tonkin, direktis la jenan leteron al la svedaj esperantistoj, pere de la prezidanto de SEF, Roland Lindblom, okaze de la forpaso de Einar Dahl:

Kun granda bedaŭro mi ĵus ricevis de nia Centra Oficejo la informon, ke forpasis nia multmerita Honora Membro s-ro Einar Dahl. Mi scias, ke mi esprimas la sentojn de nia tuta membraro transdonante al vi, kiel Prezidanto de la Sveda Esperanto-Federacio, niajn sincere kondolencojn kaj nian altan estimon al la forpasinto.

rio de la kontraŭalkohola (abstinencula) parlamenta grupo socialdemokrata.

Paralele kun sia politika kariero li sukcese partoprenis la planadon de la novaj lernejoj en Uddevalla. En 1950 li estis nomita supera instruisto de la popola lernejo, pli poste rektoro. Tiun oficon li havis ĝis la emeritiĝo.

Multaj Uddevallanoj ankoraŭ memoras la junan Einar Dahl kiel gvidantan revuteatran artiston. Jam en sia naskiĝurbo Falun li okupis sin pri revuteatro, kaj tiun ŝatokupon li daŭrigis poste en Uddevalla. Siatepe li havis seriozan emon dediĉi sin al la profesio de aktoro anstataŭ tiu de instruisto.

Kanto kaj muziko vive esprimiĝis ĉe Einar Dahl, ankaŭ post la tempo de la revuteatraj pre-

zentadoj. En multaj situacioj li prizorgis la distron de publiko. Li estis ankaŭ iniciatinto de la muzika korpuso de la urbo Uddevalla.

Esperanto estis lia granda intereso tute speciala. Einar Dahl startis lingvajn kursojn, kaj mem verkis lernolibrojn. Dum multaj jaroj li apartenis al la gvida instanco de la internacia esperantomovado. Li plene fidis je esperanto kiel rimedo de komunikado inter homoj de diversaj lingvoj. Li korespondis mem en tiu lingvo kun multaj geamikoj tra la mondo.

Einar Dahl estis engaĝita en la laboro por rilatoj inter homoj kaj landoj. Multan tempon kaj energion li dediĉis al la laboro en la societo Nordio (Norden). Dum multaj jaroj li estis prezidanto de tiu societo en Uddevalla kaj vicprezidanto de la distrikta societo. Antaŭ nelonge, en printempo 1978, la tutlanda societo omaĝis lin per transdo-

La historiistoj ĉefe memoros s-ron Dahl kiel pioniron de la parlamenta agado por Esperanto, kie li montris vojon al la multaj agantoj sur tiu tereno. Sed liaj pli proksimaj konatoj tenos en memoro bildon (kaj sonon) pli karan: Einar Dahl, kiu gvidas la kantadon de La Himno en tiel multaj Universalaj Kongresoj, per sia fortega sed melodia voĉo. Tiu bildo de optimismo kaj kuraĝo estu ekzemplo por ni ĉiuj.

Bonvolu transdoni al liaj familianoj nian respekton kaj kondolencojn.

Sincere via,

Humphrey Tonkin

no de la honora medalo de tiu societo.

Estas neeble menciigi ĉiujn postenojn, kiujn tenis Einar Dahl en siaj jaroj de agado. La lastajn jarojn li iom post iom demisiis de siaj postenoj, sed kelkajn precipajn li retenis aparte longe. Nur antaŭ iu jaro li forlasis la fondaĵon de Gustafsberg, en kiu li aktivis plenajn 45 jarojn. Preskaŭ same longe li donis siajn fortojn al la metia lernejo de Gräskärr, kies prezidantecon li lasis en 1976, post 40 aktivaj jaroj, inter ili 17 kiel prezidanto. En la pasintaj jaroj li ankaŭ apartenis kiel ŝarĝito, prezidanto kaj estrarano i.a. en la fondaĵo de Max Albin Dahlgren, en la societo Tago de Infanoj, Popola Parko, Popola Domo, Sporta Halo ktp ktp.

(Tradukis Inter)

FLYG? TÅG? ALLA DETALJER OM RESAN I NÄSTA NUMMER AV LA ESPERO!

Kongressresan